

## & Ĉastemulino:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 814 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per melodio el kino "Asteriks kaj Kleopatra" kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<: 37 > (/mi3re mifa laso mire; mi3re mifa mire Ti; mi3re mifa laso mire; mi3re mifa doTi La,

(#Rekantaĵe: mi3re mifa laso mire; mi3re mifa mire Ti; mi3re mifa laso mire; mi3re mifa doTi La, SoSo mimi doTi SoTi La)

)×22 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua:

'1 /Estu pluv- aŭ sun-vetero, ; Pro la korpa estetik'  
; Faru kun aŭ sen haltero ; Iom pli da gimnastik'.

(×:; **Tago brilas hela sune ; Nokte lumas bela lun' ; Ĉenon iru jenan kune ; Paŝu pro la oportun' ; Post rekanto plu rakontu nun.**)

'2 Ĉiutage kvaronhoron ; Vi dediĉu al la san' ;  
Ekzercante ĉiun poron, ; Ĉiun parton de organ'.

.....

'3 Kaj por ke bacil' ne ĝermu ; Pro malsaĝa  
higien', ; La fenestrojn vi malfermu ; Post forigo  
de l' kurten'. .....

'4 Jako, veŝto, eĉ kalsono ; Ĝenus viajn movojn,  
dum ; – Sendepende de l' sezono – ; Taŭgas nur l'  
Adam-kostum'! .....

#### ,& Dua:

'5 Jen la burĝo Dikapot, ; Kiu vole kaj konscie ;  
Ĉiutage sen trikot' ; Gimnastikas energie. ....

'6 Unu, du.. la dekstra krur' ; Levas sin dum la  
maldekstra ; Sin apogas kontraŭ mur', ; Kio estas  
ĝuo ekstra, .....

'7 Unu, du.. nun trunkoklin' ; kun postaĵ-altiĝ'  
kontrasta, ; Tiel, ke la rusta spin' ; Refariĝu jun-  
elasta. ....

'8 Unu, du.. jen sur la kap' ; Dikapot sin tenas  
bone; Unu, du.. ĵus forta frap' ; Bruis ĉela pord'  
ordone! .....

'9 Pliinsistas jam la bru', ; Kvazaŭ dum koler'  
arpeĝoj, ; Kun minaco de detru' ; En la nomo de la  
leĝoj. ....

'10 "Nun malfermu, civitan"', ; De ekstere sonas  
peto, ; "La policokapitan' ; Al vi venas por  
enketo!" .....

'11 Dikapot ĉe l' pordo-ans' ; Sur sin metas  
tablotukon, ; Ĉar en ĉiu cirkonstanc' ; Oni montru  
bonedukon. ....

'12 Li malfermas sen protest'.. ; Jen ĉe l' pordo vir'  
postenas ; Dum, pro lia stranga vest', ; Sinjorino  
preskaŭ svenas. ....

'13 Tuj la viro diras: "Nu, ; Ŝajnas, ke ni trafis  
ĝuste: ; Nuda sube de l' genu' ; Nuda ankaŭ  
ĉirkaŭbruste. ....

'14 Danku Dion, sinjorin', ; Ke – (la mezon  
inkluzive) – ; Li almenaŭ parte sin ; Kovris,  
kvankam primitive. ....

'15 Tiel statas la afer"', ; – Li al Dikapot pretendas:  
; "Kontraŭ via nud-aper' ; Tiu sinjorino plendas,  
.....

'16 Ĉar vi trude dum maten' ; Strange vin  
metamorfozas; Ĉe l' fenestro, sen kurten' ; Vi  
tutnuda vin ekspozas!" .....

'17 "Jes, sinjoro, tiu scen' –" ; Nun la sinjorin'  
impone ; Diras – "estas abomen', ; Kiu ĝenas min  
persone."

'18 "Sed permesu", – Dikapot ; Vigle provas sin  
defendi, ; "Ja ne temas pri komplot' ; Por vin iel  
ajn ofendi, – .....

'19 Nur honeste, kun fervor', ; Kiel Higien'  
indikas, ; Mi dum frumatena hor' ; Pro la sano  
gimnastikas. ....

'20 Krome, vi konstatu, ke l' ; Plej proksima dom-  
najbaro ; Loĝas je duna mejl' ; De ĉi tiu trotuaro!"  
.....

'21 "Fakte, ja ne estas ŝanc"', ; – Nun la policist'  
komprenas, "Ke je tiu ĉi distanc' ; La sinjoro iun  
ĝenas." .....

'22 Tiam la ĉastemulin' ; Ĵuras pure kaj lojale: ;  
"Kredu, ke mi vidas lin ; Per.. binoklo tre detale."  
.....)